# 66a Hispana Kongreso de Esperanto

La ĉi-jara Kongreso de Esperanto de nia lando okazis en Palos de la Frontera (Huelva) de la 5-a ĝis 8-a Julio kune kun la Kongreso de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. El la programo indas mencii:
**Ekspozicioj**: libroj kaj aliaj objektoj.
**Ceramikekspozicio**. Francisca Alfonso kaj Chata Terrades
Prezentado de filmoj ***Sevilla-maravilla***, **Valencio en fajro**, ***Chopin revenas al Majorko***, ***Muroj kaj miljardoj***, ***Bona Espero***, filmitaj kaj komentitaj de Roman Dobrzyński (Aŭtoro de la libro "La Zamenhofstrato", kun interparoloj kun d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof).




**Seminarioj**: "Transitiveco je la verboj en Esperanto". Djorge Obradoviĉ. (sloveno, inĝeniero). "Uzado de "si" kaj "sia" en Esperanto". Fran-cisko Simonet (el Parizo, Akademiano, estrarano de Libero por la Lingvoj). "Kunmetitaj verbo-formoj en Esperanto". Zlatko Tišljar. (kroato, nun loĝanta en Slovenio, Komitatano de UEA dum dudek jaroj). "La uzado de prepozicioj". Augusto Casquero. (Prezidanto de HEF).
**Prelegoj**: "Liberon por la lingvoj" kaj "Unuaj momentoj de la historio de la Lingvo Internacia" (Francisko Simonet). La virinoj en la esperantistaro (Grazina Opulskine), el Litovio. "Esperanto, kiel identeca lingvo de EU, defendas malgrandajn lingvojn en la Unio" (Zlatko Tišljar). La serĉado de natura metodo por la instruado de Esperanto (Miguel G. Adúriz, kantabra verkisto kaj eldonisto en Esperanto). Linukso kaj Esperanto; kiel enmeti artikolon ĉe Vikipedio (José Carlos Cuevas). "La Esperanta muziko". (Eduardo Vargas, malaga muzikisto). "La vivo en Ĉinio" (Augusto Casquero). "Malsamaj starpunktoj ĉe la nuna Esperanta mondo" (Fabián).
**Amuzaĵoj**: Loka artludado. Koncerto de Solo-tronik. Kultura vizito ĉe lokaj monumentoj. La Rábida kaj kolumbaj lokoj. Koncerto de Jomart kaj Nataŝa (kazaĵoj, loĝantaj en Stokholmo, Svedio) kaj loka Flamenka Grupo. Iluziista ludado.
**Prezentado de libroj**: traduko de "Platero kaj mi". Vortaro "AmikA" de Miguel Gutiérrez Adúriz.
**Kunsidoj** de HEF, AEU kaj JUSE.
**Kursoj**: Kurso por komencantoj (instruis laŭ la Cseh-metodo: Gražina Opulskienė). Oni transdonis staĝdiplomojn al la gelernantoj kiuj sukcesis la staĝekzamenon.
Omaĝo al samideano Alfonso Escamilla Roa. Prezento de la omaĝa libro.

# Ampleksa kolekto de Boletin, nun en Interreto

La HEF-portalo **http://www.esperanto.es** inaŭguris novan sekcion longe atenditan: "BOLETIN".
Ĝi enhavas ampleksegan kolekton de "Boletín"-oj de Hispana Esperanto-Federacio ekde la numero 1, de la jaro 1949, ĝis la laste aperinta en la nuna jaro, numero 378. Mankas pluraj ekzempleroj, dezirinde kompletigotaj per pruntedono por skanado far esperantistoj posedantaj ilin. La malnovaj numeroj devenas el la kolekto de la Gazetoteko Lanti. La kolekto atingeblas per la ligilo "Boletín" en la adreso: **http://www.esperanto.es**